

## Tangua

Mi konsentis tute ne pri la konduto de Sam, eĉ ĉagreniĝis pri tio. Winnetou estis logota en embuskon kun sia patro, kaj aro de kvindek militistoj! Se tio sukcesus, la du ĉefoj kaj iliaj apaĉoj estus pereintaj. Kiel Sam Hawkens nur povis proponi tion! Li ja sciis, ke mi estis treege impresita de Winnetou, ĉar mi estis dirinta ĝin al li. Aliflanke mi sciis, ke ankaŭ Sam ŝatis la junan apaĉoĉefon.

Ĉiuj miaj provoj interparoli kun li survoje estis vanaj. Li ne cedis de la flanko de la estro de la esploristoj. Tio ĉagrenis min eĉ plie. Se mi iam estis en malbona animstato, ĝi estis je tiu tago, kiam ni atingis la tendejon je la krepusko. Mi iĝis de la ĉevalo, ĝin senseligis, kaj kuŝiĝis sur la herbejon malgaje. Sam estis neatentadinta pri ĉiuj iaj gestoj, kaj nun rakontis al la tendejanoj, kiel ni renkontis la kajovojn, kaj kio nun okazu. Komence ili estis ektimintaj pri la ĉeesto de la indianoj. Des pli ili nun ĝojis, kiam ili aŭdis, ke la kajovoj estis niaj amikoj kaj aliancinoj, kaj ke ni nun ne plu devis aflikti pri la apaĉoj. Savate de la ducent kajovoj ni povis pluigi nian laboradon.

La indianoj estis akceptataj amikece, servitaj per ursoviandaĵoj, kaj rerajdis for. Ili volis rajdadi la tutan nokton, pro informi ilian tribon laŭeble rapide. Kiam ili forestis, Sam venis al mi, kuŝiĝis flanke de mi, kaj diris en sia kutima, supera maniero:

„Vi mienas tute ne bone ĉi nokte, *Sir!* Do certe Vi havas ĝenon de la digestado aŭ de la animaj internaĵoj, hihihih. Kiu el tiuj du estas la fakta? Mi kredas, ke estas la dua. Ĉu ĝustas?“

„Jes, certe!“ mi respondis ne vere amikece.

„Nu malglaciigu Vian koron, kaj diru al mi, kio afliktas Vin. Mi kuracos Vin.“

„Plaĉus al mi, se Vi ĝin kapablus, Sam. Sed mi dubas pri tio.“

„Mi kapablas, Vi povas esti certe pri tio.“

„Do bonvolu diri al mi, Sam, kiel plaĉis Winnetou al Vi!“

„Bonege. Do same kiel al Vi!“

„Kaj nun Vi volas pereigi lin! Kiel Vi volas tion rimigi?“

„Pereigi, ĉu? Mi lin, ĉu? Tio ne ekideos al la filo de mia patro.“

„Sed li ja estos kaptata!“

„Certe jes.“

„Kaj tio estos lia pere!“

„Do ne kredu al fantomoj, *Sir!* Winnetou plaĉas tiel bone al mi, ke mi ĉiatempe riskus mian vivon, se li troviĝus en danĝero.“

„Kial Vi tiukaze logas lin en embuskon?“

„Pro savi nin antaŭ li kaj siaj apaĉoj.“

„Kaj kio okazu poste?“

„Ĉu poste? Hm! Vi do intencas zorgiĝi pri tiu juna apaĉo, ĉu, *Sir?*“

„Mi ne nur intencas, mi fakte ĝin faros! Se li estos kaptita, mi liberigos lin. Kaj eĉ se la armiloj estos uzataj kontraŭ li, mi stariĝos je lia flanko, kaj batalos pro li. Tion mi volas diri al Vi malkaŝe kaj honeste.“

„Ĉu? Ĉu Vi faru tion? Ĉu vere?“

„Jes. Mi ĝin promesis kore al mortanto. Tiu promeso estas sankta al mi, same kiel ĵuro.“

„Ĝojas min, ĝojas min ege. Ni pri tio tute konsentas, ni du.“

„Sed“, mi urgis senpaccence, „nu diru al mi, kiel mi harmonigu tiujn belajn paroladojn kun via malica intenco!“

„Ĉu Vi volas scii ĝin? Hm, jes, Via olda Sam Hawkens certe rimarkis, ke Vi volis paroli kun li survoje. Sed ne eblis. Tio estus komplete damaĝinta mian tutan bonan planon. Mi estas tute alia ulo, kaj celas al tute alia celo, kiel ĝi ŝajnas. M<sup>3</sup> nur ne permesas, ke ajn ĉiu ekkonas mian ludkartaron, hihihih! Sed al Vi, mi povas permesi ĝin. Vi helpas al mi. Dick Stone kaj Will Parker ankaŭ, se mi n'eras. Nu do: laŭ mia pritakso de Intŝu-tŝuna, li kaj Winnetou ne nur estis iomete esploranta, sed li dume armiĝigis kaj elrajdigis siajn militistojn. Certe ili jam antaŭiĝis decan distancon. Ĉar li rajdas la tutan nokton, mi supozas, ke li volas atingi ilin jam morgaŭ frue, alikaze li ne estus peniganta sian ĉevalon en tiu maniero. Postmorgaŭ matene li do jam povas reesti tie ĉi. Nun Vi ekkonas, en kia danĝero ni estas, kaj kiel proksime ĝi estas! Vere estis bone, ke ni sekvis ilian spuron. Kaj estis bone, ke ni trovis la kajovojojn, kaj eksciis ĉion de ili. Ili venigos iliajn ducent rajdantojn tien ĉi, kaj—“

„Mi avertos Winnetoun pri la kajovojoj“, mi interrompis lian paroladon.

„Pro la sankta ĉielo, ne!“ li vokis. „Tio nur estus damaĝo al ni, ĉar la apaĉoj saviĝus, kaj ni ankoraŭ estus en danĝero per ili, malgraŭ la ĉeesto de la kajovojoj. Ne, ili estu kaptotaj, kaj ili vidu ilian morton antaŭ la okuloj. Kiam ni tiam liberigos ilin kaŝe, ili estu dankaj al ni, kaj rezignu pri ilia venĝoplanado. Ekstremkaze, ili postulos la eldonon de Rattler, kaj tion mi ne rifuzus. Kion Vi diras nun, kolera *gentleman*?“

Mi ofertis mian manon al li.

„Mi estas komplete trankviligita, mia kara Sam. Tion Vi tre bone elpensis!“

„Ĉu ne? Laŭdire tiu Sam Hawkens ja manĝas kampomusojn, sed same li havas ankaŭ kelkajn bonajn aspektojn, hihihih! Nu, ĉu Vi rekonsentas kun mi? Do ruliĝu sur la flankon, kaj baldaŭ ekdormu. Morgaŭ multo farendos. Mi dume informos Stone-on kaj Parker-on, proke ili scias, kiujn kartojn ni metos sur la tablon.“

Post Sam foriĝis, mi provis dormi, sed longe ne povis kvietiĝi. La tendanoj ĝojis pri nia alianco kun la kajovojoj, kaj interparolis tiel laŭte pri tio, ke estus estinta artaĵo dormi je tiu bruo. Krome miaj memaj pensoj ne lasis min trankviliĝi. Hawkens parolis tiel certece pri sia plano, kvazaŭ malsukceso tute ne eblis. Sed mi tute ne partoprenis en lia optimismo.

Ni volis liberigi Winnetoun kaj lian patron. Sed kio okazu al la aliaj kaptotaj apaĉoj, tio neniam estis temo. Ĉu ili restu kaptataj de la kajovojoj, dum iliaj du ĉefoj estus liberigotaj? Tio ŝajnis ega nejusteco al mi. Sed la liberigo de ĉiuj apaĉoj apenaŭ eblus sukcesi al ni kvar viroj, des pli multe, ĉar tio ja okazu kaŝe, proke ni ne evidentiĝus. Kaj en kiu maniero la apaĉoj estu kaptotaj de la kajovojoj? Certe apenaŭ sen batalo. Estis antaŭvidebla, ke la du ĉefoj defenidiĝos forte dum tio, kaj ke tio plej ege endanĝerigos ilin.

Kiel ni povis eviti tion? Se ili ne estus lasontaj venki ilin, ili verŝajne estos mortigantaj de la kajovajoj. Sed tio neniukaze okazu.

Mi pensadis longe pri tio, kaj ruliĝadis jen kaj reen, senke mi trovis kontentiĝon. La sola pensaĵo, kiu finfine trankviligis min, estis tiu, ke la malgranda ruza Sam certe estos trovanta solucion. Ĉiukaze mi planis certe, pledi pro la du ĉefoj. Tiam mi finfine ekdormis.

La sekvintan matenon mi okupiĝis per duobla fervoro pri la laboro, ĉar mi estis hieraŭ mankinta. Ĉar ĉiu klopodis, ni antaŭiĝis pli rapide ol antaŭe. Rattler sin tenis for de ni. Li migradis jen kaj reen, sed estis traktata de siaj „okzidentuloj“ tute amikece, kvazaŭ nenio okazis. Je la vespero, ni estis mezurintaj preskaŭ duoble longan vojon, kiel antaŭe. Tial ni estis tre dormemaj, kaj ekdormis post la vespermanĝo. La tendejo estis plu antaŭenigita dum la tago.

La nekstan tagon, ni estis same diligente, ĝis aperis interromp ĉirkaŭ tagmezo. La kajovajoj venis. Iliaj esploristoj estis trovintaj nin tre facile, ĉar la spurojn, kiujn ni faris, estis tre klare videblaj.

La indianoj havis fortajn, militecajn korpojn. Ili havis tre bonajn ĉevalojn, kaj estis armitaj senescepte per pafilo, tranĉilo kaj *tomahawk*. Mi nombrigis pli ol ducent virojn. Ilia estro estis altkreskita, havis ridigan, seriozegan vizaĝon kaj rabobestajn okulojn, de kiuj nenio bona estis ekspektinda. Li nomiĝis Tangua, kio laŭvorte signifas ĉefo. Per tio konkludeblis, ke li, almenaŭ kiel ĉefo, ne bezonis timi konkurencon. Kiam mi rigardis lian vizaĝon kaj liajn okulojn, mi eke sentis timon, kaj teruron pri la vivo de Intŝu-tŝuna kaj Winnetou. Tangua venis kiel amiko kaj aliancano, sed tute ne kondutis amikece. Je lia alveno li ne tuj iĝis de sia ĉevalo pro saluti nin, sed faris ordonecan brakomovon, kiu ĉirkaŭiĝis nin de ĉiuj siaj anoj. Post tio li rajdis al nia ĉaro, kaj mallevis la kovraĵon pro envidi. La enhavo ŝajnis allogi lin, ĉar li iĝis de la ĉevalo, kaj en la ĉaron, pro esplori ĝin pli detale.

„Hoho!“ diris Sam Hawkens, kiu staris flanke de ni. „Tiu ulo ŝajnas rigardi nin kaj niajn posedaĵojn kiel bona kaptajo, jam antaŭ ke li estis interparolinta unu vorton kun ni, se mi n’eraras. Se li kredas, ke Sam Hawkens estas tiel stulta dungi kapron kiel ĝardenisto, li certe eraras. Tion mi tuj montros al li.“

„Ne agu senpripense, Sam!“ mi petis. „Tiuj ducent indianoj superas nin.“

„Je nombro jes, je sprito certe ne, hihihih!“ li respondis.

„Sed ili ĉirkaŭas nin!“

„Well, tion mi povas ankaŭ vidi. Aŭ ĉu Vi kredas, ke mi ne havas okulojn? Ni venigis, laŭŝajne, ne vere bonajn helphelpantojn. Ĉar ili ĉirkaŭas nin, mi supozas, ke li intencas enpoŝigi nin kune kun la apaĉojn. Sed tiu mordajo pezos ege en lia stomako, tion mi certigas al Vi. Kunvenu al la ĉaro, proke Vi aŭdos, kiel Sam Hawkens parolas kun tiuj fibuboj! Mi estas bona konatulo de tiu Tangua. Li scias ekzakte, ke mi troviĝas tie ĉi. Lia agado do ne nur estas ĉagreniga al mi, sed pensigu nin ĉiujn. Nur vidu la obskurajn vizaĝojn de liaj anoj! Mi nun memorigos lin pri mia ĉeesto. Venu!“

Ni havis niajn pafilojn en la manoj, kaj iris al la ĉaro, en kiu Tangua fiŝercadis. Mi ne sentis tute sendanĝera dum tio. Kiam ni estis alvenintaj, Sam averte demandis:

„Ĉu la fama ĉefo de la kajovajoj volas iri al la Ĉiama Ĉasejo?“

Tangua rektiĝis el sia kliniĝa pozicio, turniĝis al ni, kaj krude respondis:

„Kial la palvizaĝoj ĝenas min per tiu stulta demando? Tangua iam regos en la Ĉiama Ĉasejo kiel granda ĉefo. Sed ankoraŭ pasos longa tempo, ĝis li survojiĝos tien.“

„Tiu tempo eble estos nur unu minuto.“

„Kial?“

„Iĝu de la ĉaro, tiam mi ĝin klarigos al vi. Sed hastu!“

„Mi restas tie ĉi!“

„Nu, tiukaze vi estos diŝirata.“

Dum tiuj vortoj Sam turniĝis, kaj agis kvazaŭ li volis foriri.

La ĉefo subite eksaltis de la ĉaro, ekprenis lian brakon, kaj vokis:

„Ĉu diŝirata? Kial Sam Hawkens diris tiajn vortojn?“

„Pro averti vin.“

„Pri kio?“

„Pri la morto, kiu estus kaptinta vin, se vi estus restinta tie nur malmultajn momentojn plu.“

„Uf! Ĉu la morto estas en tiu ĉaro? Ĝin montru al mi!“

„Baldaŭ, eble. Ĉu la mesaĝistoj ne diris al vi, kial ni estas tie ĉi?“

„Ili ĝin diris al mi. Vi volas konstrui vojon por la fajroĉevalo de la palvizaĝoj.“

„Prave! Tia vojo iros trans riveroj kaj profundaĵoj, kaj tra rokoj, kiujn ni diskrevigas. Mi pensas, ke vi scias tion.“

„Mi scias. Sed kiel tio rilatas al la morto, kiu minacis al mi?“

„Tre rekte. Ĉu vi iam ekkonis, per kio ni krevigas la rokojn, kiuj baras la vojon de nia fajroĉevalo? Ĉu eble per l pulvo, per kiu vi pafigas viajn pafilojn?“

„Ne. La palvizaĝoj kreis alian elpensaĵon, per kies helpo ili kapablas disbategi eĉ montojn.“

„Prave! Kaj tiun elpensaĵon ni havas sur tiu ĉi ĉaro. Ĝi ja estas garde pakita, sed kiu ne scias, kiel oni traktu tiun pakajon, ekmortos tuj kiam li tuŝas ĝin. Ĝi eksplodas en liaj manoj, kaj krevigas lin en mil etajn pecojn.“

„Uf, uf! li vokis timigite. „Ĉu mi estis proksime al tiuj pakajoj?“

„Tiel proksime, ke vi troviĝus en la Ĉiama Ĉasejo jam nun, se vi ne estus desaltinta. Kaj kiu nun estus videbla de vi? Neniu medicinaĵo, neniu kapobuklo, nenio, tute nenio, nur etaj pecoj da karno kaj ostoj. Kiel vi volas regi en tia stato en la Ĉiama Ĉasejo? Viaj restaĵoj estus pistataj de la fantomĉevaloj.“

Indiano, kiu venas en la Ĉiaman Ĉasejon sen kapobuklo aŭ medicinaĵo, estas akceptata de la mortaj herooj per malestimo, kaj li kaŝu sin antaŭ la okuloj de ĉiu beatulo. Tio estas la kredo de la ruĝuloj. Kia malfeliĉo ĝi estus, alveni tie en etaj pecoj! Malgraŭ la malhela koloro, oni povis vidi, ke la sango foriĝis el la vizaĝo per teruro.

„Uf! Do kiel bone, ke vi diris tion al mi ĝustatempe! Sed kial vi deponas tiun elpensaĵon en la ĉaro, en kiu ankaŭ troviĝas multaj aliaj aĵoj?“

„Nu ĉu ni metu tiujn gravajn pakajojn sur la teron, kie ili malboniĝos, kaj povas kaŭzi plej grandan malfeliĉon je eta tuŝo? Mi diras al vi, ke ili tamen estas sufiĉe danĝeraj sur la ĉaro. Kiam tia pakajo eksplodas, ĝi krevigas ĉion, kio troviĝas en la proksimejo.“

„Ĉu ankaŭ la homojn?“

„Memkompreneble, ankaŭ la homojn kaj la bestojn en la ĉirkaŭo, kiu vastas dekoble cent ĉevalolongecojn.“

„Tiukaze mi diru al miaj militistoj, ke neniu el ili proksimiĝu al tiu danĝera ĉaro.“

„Faru tion. Mi eĉ petas vin, proke ni ĉiuj ne pereos per malatentaĵo! Vi vidas, kiel zorga mi estas pri vi, ĉar mi kredis, ke la militistoj de la kajovajoj estas niaj amikoj. Sed ŝajne mi eraris. Kiam amikoj renkontiĝas, ili salutas unu la alian, kaj kune fumas la pipon de la paco. Ĉu vi hodiaŭ intencas agi kontraŭ tiu moro?“

„Vi ja jam fumis la pacopipo kun la Vulpo, mia esploristo!“

„Nur mi kaj la blanka militisto, kiu staras ĉi flanke de mi. Ne la aliaj. Ĉu vi ne volas saluti ankaŭ ilin? Alikaze mi pensu, ke via amikeco ne seriozas.“

Tangua momenton pripensante ĉirkaŭvidis, kaj tiam respondis per senkulpiĝaĉo:

„Ni troviĝas en milito, kaj tial ne kunhavas la pacan kinikinikon.“

„La buŝo de kajovaja ĉefo parolas alie, kiel pensas sia koro. Mi vidas la saketon de la kinikiniko pendi de via zono, kaj ĝi ŝajnas plena. Ni eĉ ne bezonas ĝin, ĉar ni havas sufiĉe da tabakon mem. Ja ne ĉiu partoprenu en la kalumetado. Vi fumos pro vi kaj viaj militistoj, kaj mi fumos pro mi kaj la ĉi ĉeestantaj blankuloj. Tiel la amikeca alianco validos al ĉiuj viroj, kiuj troviĝas tie ĉi.“

„Kial ni du fumu, kiam ni jam estas fratoj? Sam Hawkens supozu, ke ni estis fumintaj la kalumeton pro ĉiuj.“

„Laŭ via volo! Sed tiukaze ni faros, kion ni volas, kaj vi ne ricevos la apaĉojn sub vian forton.“

„Do ĉu vi volas averti ilin?“ Tangua demandis. Liaj okuloj brilis danĝere.

„Ne. Tio ne ekideus al mi, ĉar ili estas niaj malamikoj, kaj ili volas mortigi nin. Sed mi ne diros al vi, en kiu maniero vi povas kapti ilin.“

„Mi ne bezonas vin pro tio. Mi ĝin scias mem.“

„Hoho! Do ĉu vi scias, kiam kaj el kiu direkto ili venos, kaj kie ni povos trovi ilin?“

„Mi ĝin scios, ĉar mi elsendos miajn esploristojn.“

„Tion vi faros ne, ĉar vi estas sufiĉe saĝa diri al vi, ke la apaĉoj trovos la spurojn de viaj esploristoj, kaj ili tuj pretiĝos por la batalo. Tiukaze ne estus tre verŝajne, ke vi povos kapti ilin. Sed mi havas planon, kiu eblas embuskigi kaj surprize kapti ilin, sen ilia antaŭscio, se mi n'eraras.“

Mi vidis, ke tiu klarigo faris impreson. Tangua diris post mallonga pripenso:

„Mi interparolos kun miaj militistoj.“

Li iris la la Vulpo, kaj mansigne alvenigis kelkajn kromajn ruĝulojn. Ni vidis, kiel ili interparolis.

„Ke li volas paroli kun tiuj uloj antaŭe, ne ŝajnas bona signo al ni!“ Sam diris.

„Mi pensis, ke vi estas lia amiko, ĉu?“ mi respondis.

„Ĉu amiko? Kiun vi povas nomi amiko inter tiuj kajovajoj! Ili estas fiuloj, kaj vivas nur per rabado. Oni estas iliaj amikoj nur tiel longe, kiel ili ne povas forpreni ion de oni. Sed ni havas ĉaron plena je mangaĵoj, kiuj estas tre valoraj al la ruĝuloj. Tion la esploristoj diris al ilia ĉefo. Ekde tiu momento estis decidita, ke ni estu elrobotaj.“

„Kaj nun, ĉu?“

„Ĉu nun? Hm, nun ni estas savaj.“

„Se vi pravus, tio certe plaĉus al mi.“

„Mi pensas, ke mi pravas. Mi konas tiujn ulojn. Bonega ideo de mi, kredigi tiun ulo, ke ni havus specon de eksplodaĵo tie ĉi sur la ĉaro, hihihih! Li supozis ĉion, kio estas sur ĝi, jam kiel certa kaptaĵo. Nun mi estas konvikita, ke neniu ruĝulo riskos nur tuŝeti la ĉaron. Mi eĉ esperas, ke tiu timo ankaŭ iam estos utila al ni. Mi enpoŝigos sardinan skatolon, kaj kredigos ilin, ke ĝi enhavus dinamiton. Vi ja ankaŭ jam kunportas skatoleton, kun Viaj paperoj. Memoru tion en estontaj situacioj.“

„Bon! Ni esperu, ke tio ankaŭ kaŭzos la deziratan efikon. Sed kion vi nun opinias pri la pacopipo?“

„Estis interkonsentite, ke ĝi ne estos fumata. Nun mi pensas, ke la uloj decidis alie. Mia parolado estis klariga al la ĉefo, kaj ankaŭ konvinkis la aliajn. Tamen ni ne fidu ilin.“

„Jen Vi vidas, Sam, ke miaj priduboj tute ne estis malpravaj. Vi volis plenumi Vian planon per la helpo de la kajovajoj. Tiel Vi igis nin sub ilian forton. Mi scivolas, kio okazos!“

„Nenio alia krom tio, kion mi diris. La ĉefo volis elrabi nin, kaj poste ataki la apaĉojn memfare. Dume ili ekkonis, ke ili estas tro saĝaj lasi sin kapti kaj buĉi en tia facila maniero. Vidu! Ili finis. Tangua venas. Nun ni vidos.“

Mi antaŭsciis la decidon, jam antaŭ li estis alveninta. Per kelkaj alvokoj de la Vulpo, la aro de la ruĝuloj disiĝis. La rajdantoj deĉevaliĝis. Ni ne plu estis ĉirkaŭitaj. Tangua nun havis ete pli amikecan mienon ol antaŭe.

„Mi interparolis kun miaj militistoj“, li diris. „Ili konsentas, ke mi fumos la kalumeton kun mia frato Sam. Tio validu por ĉiuj.“

„Tion mi ekspektis, ĉar vi estas ne nur brava, sed ankaŭ saĝa viro. La militistoj de la kajovajoj proksimiĝu, kaj estu atestantoj, ke ni du interŝanĝas la fumon de la paco kaj la amikeco.“

Tiel ĝi okazis. Tangua kaj Sam Hawkens fumis la kalumeton per la jam priskribitaj decaĵoj. Nun ni povis supozi, ke ili ne ĝenus nian pacon, almenaŭ hodiaŭ kaj la sekvantajn tagojn.

Kiam mi diris ‚fumi‘ la kalumeton aŭ la pacopipon, mi uzis la al ni kutiman esprimon. La indiano ja ne diras ‚fumi‘ tabakon, sed ‚trinki‘ tabakon. Kaj li vere trinkas ĝin, ĉar kiam li fumas en indiana maniero, ki englutas la fumon, igas ĝin en la stomakon, kaj poste ellasas ĝin per opaj puŝoj.

Post nia intertempa pacigo kun la kajovajoj, Tangua postulis grandan kunsidadon, en kiu ĉiuj blankuloj partoprenu. Tio tute ne konvenis al mi, ĉar tio detenis nin de nia laboro. Tial mi petis al Sam, ke la kunsidado estu prokrastata ĝis la vespero. Mi aŭdis, ke tia interparoladaĉo de la ruĝuloj emis esti preskaŭ senfinaj. Sam parolis kun la ĉefo, kaj tiam raportis:

Kiel vera *indsmán* li ne rezignas pri lia volo. Oni ne atendu longe plu la alvenon de la apaĉoj. Tial ni havas laŭ lia opinio ne tiom da tempo por kunsidado, dum kiu mi klarigu mian planon, kaj post kiu oni ekspektende dece manĝados. Manĝaĵojn ni ja havas, kaj la kajovajoj kunportis sufiĉe da sekigita viando sur iliaj portoĉevaloj. Sed feliĉe mi almenaŭ ebligis, ke nur Dick Stone, Will Parker kaj mi partoprenos. Vi aliaj estas permesataj redaŭrigi la laboradon.“

„Ĉu permesataj? Kvazaŭ ni bezonus la permeson de la *indsmán*-oj. Mi tute ne atentis, kion ili permesas aŭ ne!“

„Ne damaĝu mian planon, *Sir!* Pli bone agu, kvazaŭ Vi ne estus rimarkinta tiajn aĵojn! Ni ne kolerigu ilin kontraŭ ni, se ĉio finiĝu bone.“

„Sed mi ankaŭ volas partopreni en la kunsidado!“

„Ne necesas.“

„Ĉu ne? Mi ja devas scii, kio estos decidata!“

„Mi sciigos Vin pri tio.“

„Sed kio, se vi estos plananta ion, kion mi ne povas toleri?“

„Ĉu toleri? Ĉu Vi? Do vidu al tiu *greenborn!* Do vere imagas, ke li antaŭe aprobu, kion Sam Hawkens decidis. Mi do ankaŭ devas peti Vian permeson, kiam mi volas mallongigi miajn ungojn, aŭ plibonigi miajn botojn, ĉu?“

„Tion mi ja ne diris. Mi nur volas esti certe, ke nenio estos decidata, kio endanĝerigos la vivojn de niaj du apaĉoj.“

„Vi povas fidi pri Via olda Sam Hawkens. Mi ĵuras al Vi, ke ili iĝos el la afero kun sana haŭto. Ĉu tio sufiĉas?“

„Jes, Vian ĵuron mi honoras. Mi pensas, ke se Vi iam ĵuras, Vi ankaŭ atentos, ke ĝi efikiĝos.“

„*Well!* Do eklaboru kaj estu konvinkita, ke ankaŭ la afero finiĝos bone sen Vi, kvazaŭ Vi mem havis Vian manon en ĝi!“

Mi devis kontenti. Treege gravis al mi, ke ni estos finigintaj nian mezuradon jam antaŭ la renkonto kun la apaĉoj. Ni eklaboregis pri nia sekcio tre baldaŭ, ĉar Bancroft kaj siaj tri viroj elĉerpis ĉiujn iliajn fortojn.

Se ni ne ege estus hastantaj, la apaĉoj venus, ankaŭ ni estis finiginta la laboron. Tiukaze ni estus malbonfartigataj, aŭ de ili, aŭ de la kajovajoj. Sed se ni estus finigintaj nian laboron antaŭ tio, eble ekzistis la ŝanco forsaviĝi ĝustatempe.

Tion mi diris al la viroj, kaj tial ili laboris per klopodo kaj streĉiĝo, kiuj neniam antaŭe estis rimarkeble je ili. Sed fakte mi tute ne pensis pri fiforiĝi. La farto de Winnetou tree gravis al mia koro. La aliaj povis fari, kion ili volis. Mi estis firmanime ne foriri, ĝis mi povis esti certe, ke neniu danĝero plu minacis al li.

Mia tasko ne nur estas la mezurado, sed ankaŭ skribe raporti pri la laborado, kaj fari la desegnaĵojn. Mi desegnis ĉiun skizon duoble. Unu el ili ricevis la ĉefinĝeniero, la alian mi faris kaŝe por mi mem, pro ajn iu kriza kazo. Nia situacio estis tia, ke tiu atento ŝajnis ĝusta.

La kunsidado vere daŭris ĝis la vespero. Ĝi ĵus finiĝis, kiam la malheliĝo devigis ĉesi nin. La kajovajoj estis en tre bona humuro, ĉar Sam Hawkens faris la eraraĵon, aŭ sameble la saĝaĵon, doni al ili la reston de la brando. Pluraj fajroj brulis, ĉirkaŭ kiuj sidis la festenantaj ruĝuloj. Flanke de tio la ĉevaloj paŝtiĝis, kaj pli fore en la malhelo staris la gardistoj, kiujn la ĉefo postenigis.

Mi sidiĝis apud Sam:on kaj liaj nedisigeblaj kunuloj Parker kaj Stone, enprenis mian vespermanĝon, kaj vidadis trans la tendejo. Ĝi aspektis tre militeca. Nia brando sufiĉis nur tiel, ke ĉiu ricevis kvin aŭ ses glutojn. Neniu el la ruĝuloj ebruis, sed la fajrakvo sufiĉe ardigis ilin, ĉar ili ne estis kutimiĝintaj al ĝi. La *indsmen*:oj estis multe pli vigle, kaj ankaŭ pli laŭte ol kutime.

Nun mi demandis Sam:on pri la rezultoj de la interparolado.

„Vi povas kontenti“, li diris. „Nenio danĝera okazos al Viaj karuloj.“

„Sed kio, se ili defendiĝos?“

„Ili ne sukcesos ekdefendiĝi. Ili estos venkitaj kaj katenitaj, antaŭ ili nur ekscias, ke tio estas ebla.“

„Ĉu vere? Nu, kiel la afero do okaziĝos, laŭ Via plano?“

„Tre facile. La apaĉoj venos sur unu certa vojo. Ĉu Vi eble povas diveni, kiu tiu estos, *Sir?*“

„Jes. Ili memkompreneble iros tien, kie ili renkontis nin, kaj tiam sekvos niajn spurojn.“

„Prave! Vere Vi ne estas til stulta, kiel Vi aspektas. Do ni konas la direkton, el kiu ni ekspektu ilin veni. La laŭ graveco dua aĵo estas la tempo, kiam ili venos.“

„Oni ne povas kalkuli tion, nur supozi.“

„Jes, kiu havas sufiĉe da griza kaĉo en la kapo, povus supozi tion. Sed nura supozo ne utilas al ni. Aĵn kiu agus en nia situacio laŭ supozado, certe ankaŭ vendus sian animon. Ni bezonas certecon!“

„Tiun ni nur povas haviĝi, perke ni elsendas esploristojn kontraŭ ili. Sed tion Vi ja volis eviti, kara Sam. Vi ja havas la opinion, ke la spuroj de la esploristoj povus konebligi nian planon.“

„La spuroj de la ruĝaj esploristoj! Memorigu tion, de la ruĝaj esploristoj, *Sir!* Ke ni estas tie ĉi, tion la apaĉoj ja scias. Se ili trovas la spuron de blanka viro, tio ne estos dubigo al ili. Sed se ili trovas la spurojn de indianoj, ili estus avertataj, kaj kondukus gardiĝe. Ĉar Vi estas tiel elstarante saĝa kapo, Vi ja certe povas finpensi, kion ili supozus.“

„Ke kajovajoj estas en la proksimeco, ĉu?“

„Jes, Vi ĝin divenis fakte! Se mi ne devus trakti mian perukon tiel gardiĝe, mi nun devus depreni mian ĉapelon per estimo. Do nur imagu, ke mi ĵus deprenis ĝin!“

„Dankon, Sam! Mi volas esperi, ke tiu estimo iam malaperos. Sed plue! Vi do opinias, ke ni elsendu ne ruĝajn, sed blankajn esploristojn kontraŭ la apaĉoj, ĉu?“

„Jes, sed nur unu.“

„Ĉu tio ne estas tro malmulte?“

„Ne, ĉar tiu unu estos ulo, pri kiu oni povas fidi. Fakte li nomiĝas Sam Hawkens, se mi n'eraras, kaj kutimas manĝi kampajn musojn, hihihih! Ĉu Vi eble konas tiun ulon, *Sir?*“

„Jes“, mi asertis. „Se vere tiu unu transprenos la aferon, ni certe povos esti tute senzorge. Li ne lasos la apaĉojn kapti sin.“

„Sin kapti ne, sed lasos sin vidi.“

„Kio? Ĉu ili vidu Vin?“

„Jes.“

„Sed tiukaze ili kaptos kaj mortigos Vin!“

„Ne ekideos al ili. Ili estas multe tro saĝaj por tio. Mi ĝin aranĝos tiel, ke ili certe vidos min, proke ili ne ekscias, ke ankaŭ kajovajoj troviĝas en la proksimeco. Kaj kiam mi tute senzorge promenados antaŭ ili, ili certe supozos, ke ni sentas nin save, kiel en la sino de patrino. Ili ne faros ion al mi, tute nenion, ĉar Vi estos avertataj, se mi ne revenos en la kampejon. Laŭ ilia opinio mi ja estas samcerte kaptebla kiel poste.“

„Sed Sam, ĉu ne eblas, ke ili vidos Vin, sed Vi ne ilin?“

„*Sir*“, li grumblis amuzigite, se Vi volas tiel ofende bati mian vangon, nia interrilato estas je la fino! Mi, ne vidos ilin! La okuletoj de Sam Hawkens ja estas malgrandaj, sed tamen precizaj! La apaĉoj ne proksimiĝos tutare, sed antaŭsendos kelkajn esploristojn. Sed tiuj ne povos kaŝiĝi antaŭ mi, ĉar mi stariĝos tie, kie mi vidos ilin tutcerte. Vi sciu, ke ekzistas lokoj, kie eĉ la plej bona *scout* ne povas vidi Vin. Tiajn ejojn oni elektas, kiam oni volas kaŝe rigardi esploristojn. Tuj kiam mi vidos ilin, mi anoncos ilin al Vi, proke Vi tiam dece agos nenionsciante, kiam ili kaŝiradas ĉirkaŭ la tendejo.“

„Sed tiam ili ja vidos la kajovojojn, kaj anoncos ilin al ilia ĉefo!“

„Kiun ili vidos? Ĉu la kajovojojn? Ulo, *greenhorn*, kaj honorinda junulo, ĉu Vi vere kredas, ke la cerbo de Sam Hawkens konsistas el vato aŭ sorbopapero, he? Mi ja certe zorgiĝos, ke la kajovojoj ne estos videblaj, eĉ ne la plej eta spuron de ili, komprende. La esploristoj de la apaĉoj vidu nur tiujn homojn, kiuj estis en la tendejo, kiam Winnetou kaj sia patro tieis.“

„Nu, tiu kazo memkomprenebla estas alia afero!“

„Ĉu ne? La esploristoj do senĝene kaŝiru ĉirkaŭ nia tendejo, foriru kaj kunprenu la certecon, ke ni tute ne rimarkis ion. Kiam ili tiam malaperos, mi kaŝe sekvos ilin, pro atendi la alvenon de la tuta aro. Tiu memkompreneble ja ne venos dumtage, sed nokte, kaj iĝos laŭeble proksimen al nia tendejo. Tiam la bravaj apaĉoj atakegos nin.“

„Kaj kaptos kaj mortigos nin, almenaŭ kelkajn el ni!“

„Aŭskultu, *Sir*, Vi vere estas bedaŭrinda! Vi volas esti studiinta viro, sed eĉ ne scias, ke oni devas forkuri, se oni ne volas lasi sin kapti! Hodiaŭtage ĉiu leporo scias tion, sed Vi ne! Ĉu ĉi tio ne estas legebla en la multaj libroj, kiujn Vi legis?“

„Vi do opinias, ke ni saviĝu, ĉu?“

„Jes. Ni bruligos fajron memkompreneble, proke ili vidos klare, kie ni estas. Dum ĝi brilos, la apaĉoj restos en iliaj kaŝejoj. Ni lasos ĝin finbruli, kaj tiam foriĝos en la malhelo, pro venigi la kajovojojn. Tiam la apaĉoj kuregos en nian tendejon kaj — trovas neniun, hihihih! Ili miros, kaj rebruligos la fajron pro serĉi nin. Nun la vico estos al ni: ni atakos la apaĉojn. Tio estos spritaĵo, pri kio oni ankoraŭ estos raportonta longan tempon. Oni diros: estis Sam Hawkens, kiu elpensis tion, se mi n'eraras.“

„Jes. Ĝi estus tre bone, se ĉio okaziĝos ekzakte tiel, kaj ne alimaniere, kiel Vi ĝin planas.“

„Ne okaziĝos alie. Mi certe zorgos pro tio.“

„Kaj poste ni liberigos la apaĉojn kaŝe, ĉu?“

„Almenaŭ Intŝu-tŝunan kaj Winnetoun.“

„Ĉu ne ankaŭ la aliajn?“

„Tiom, kiom ni povas, sen atentigi pri ni.“

„Kio okazos al la aliaj?“

„Neniun seriozaĵon, *Sir*. Mi povas certigi Vin pri tio. La kajovojoj pensos malpli pri la aliaj apaĉoj en la unua momento, sed plie pri rekapti la fuĝintojn. Sed kio okazu poste, pri tio ni ne jam pene pensu. Antaŭ ĉio ni devas trovi lokon, kiu taŭgas por nia plano. Tion mi faros morgaŭ matene. Hodiaŭ ni paroladis sufiĉe. Ekde morgaŭ ni agos.“